

<https://helda.helsinki.fi>

---

þý u infana Esperanto estas natura Esperanto?

Lindstedt, Jouko

Mondial  
2016

---

þý Lindstedt , J 2016 , u infana Esperanto estas natura Esperanto? in F  
politica, cultura: Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti . Mondial , New York , pp.  
250-258 .

---

<http://hdl.handle.net/10138/165316>

---

unspecified

---

*Downloaded from Helda, University of Helsinki institutional repository.*

*This is an electronic reprint of the original article.*

*This reprint may differ from the original in pagination and typographic detail.*

*Please cite the original version.*

# Ĉu infana Esperanto estas natura Esperanto?

Jouko Lindstedt  
Helsingin yliopisto

## *Resumo*

La ekzisto de la denaskaj parolantoj de Esperanto pravas, ke strukture tiu lingvo ne signife diferencas de la naturaj lingvoj. La denaskaj parolantoj tamen ne iniciatis ŝanĝojn en la lingvo, nek havas centran rolon en la lingvokomunumo. Pro la manko de vera denaska lingvokomunumo Esperanto ne estas kreola lingvo. Tamen, en la strukturo de la lingvo okazas spontaneaj ŝanĝiĝoj, kiuj similas al tiuj okazantaj en naturaj lingvoj, kaj kiujn iniciatis anonimaj, verŝajne nedenskaj parolantoj. Por kompreni la rolojn de la denaskaj parolantoj kaj la lingvokomunumo de Esperanto, interesan paralelaĵon proponas pluraj malplimultaj lingvoj revivigataj, precipe tiuj, kiuj sociolinguistike karakterizeblas kiel engrupaj duaj lingvoj.

## *Abstract*

The fact that Esperanto has native speakers proves that its structure is not significantly different from that of natural languages. However, native speakers of Esperanto have not initiated changes in the language, nor do they have a central role in the speech community. As Esperanto does not possess a real community of native speakers, it is not a creole. Rather there have been spontaneous changes in the structure of the language that are similar to those taking place in natural languages, and which were initiated by anonymous, probably non-native speakers. For the proper understanding of the roles of native speakers and the speech community of Esperanto, an interesting parallel is presented by the minority languages being revitalized, especially those which can be sociolinguistically characterized as in-group second languages.

## *Riassunto*

L'esistenza di parlanti nativi dell'esperanto prova che dal punto di vista strutturale la lingua non è diversa in modo significativo dalle lingue naturali. I parlanti nativi tuttavia non sono stati promotori di cambiamenti nella lingua e non hanno un ruolo centrale nella comunità linguistica. A causa dell'assenza di una vera comunità linguistica di nativi l'esperanto non è un creolo. Nella struttura della lingua avvengono comunque cambiamenti spontanei simili a quelli che avvengono nelle lingue naturali, promossi da parlanti anonimi, probabilmente non nativi. Per capire i ruoli dei parlanti nativi e della

comunità linguistica dell'esperanto, un interessante parallelismo è offerto da molte lingue minoritarie richiamate in vita, soprattutto quelle che si caratterizzano sociolinguisticamente come seconda lingua di un gruppo.

### 1. Ĉu denaskaj parolantoj faras Esperanton natura lingvo?

La ĉefa objekto de lingvistikaj esploroj estas naturaj lingvoj – homaj lingvoj, kiu ekestis spontanee, ne pere de konscia planado; kiuj havas siajn radikojn profunde en la prahistorio de nia specio; kaj estas transdonataj de unu generacio de denaskaj parolantoj al alia.

Multaj lingvistoj ne scias, ke ankaŭ Esperanto havas denaskajn parolantojn, sed ja aperis kelkaj studoj priaj, inter kiuj pioniras tiuj de Renato Corsetti (1993; 1996a; 1996b; Corsetti k.a. 2004). Ĉu danke al la denaskuloj Esperanto fariĝas nun “natura lingvo” kaj valida objekto de lingvistiko?

Se lingvisto antaŭsupozas, ke la homa lingvokapablo havas specifan komponenton biologie hereditan, kaj ke la akiro de la denaska lingvo radikale diferencas de la lernado de eventualaj pli postaj lingvoj, ŝi li nature atendas, ke la denaskaj parolantoj de Esperanto ŝanĝos la strukturon de la lingvo. Tia forta antaŭsupozo videblas en la artikolo de Bergen (2001), unika ekzemplo de ne-esperantista lingvisto empirie esplorinta la temon de denaskaj Esperanto-parolantoj. Mi mem provis montri, ke la ŝanĝiĝoj, observitaj de Bergen, estas nur ŝajnaj (Lindstedt 2006: 50–52): ilin kaŭzis (a) la interfero de la aliaj denaskaj lingvoj de la infanoj observitaj, (b) la diferenco, nekonata por Bergen, de la parola kaj skriba lingvaĵoj en Esperanto kaj, iukaze, (c) nekompleta akiro de Esperanto.

Esperanto evidente estas tiom kompleta lingvosistemo, ke la denaskaj lingvoakirantoj ne bezonas ŝanĝi ĝin por konformigi ĝin al la universalajoj de la homa lingvo. Kiel esprimis Corsetti (1996b: 23) “en la kazo de Esperanto [...] ne ŝajnas esti gramatikaj truoj plenigendaj [fare de infanoj]”. Mi supozas, ke Esperanto estas kompleta lingvo, ĉar ĝin nur malgrandaparte difinas la eksplicitaj gramatikaj reguloj de la Unua Libro kaj postaj verkoj, kaj multe pli grandparte la implicitaj reguloj formiĝintaj en la praktika lingvouzo de Zamenhof kaj postaj esperantistoj (Lindstedt 2006: 52–54; 2010a: 76–77). Tio signifas, ke la lingvaj universalajoj estas iumaniere alireblaj ankaŭ por nedenkaj lingvolernanto – kaj eĉ lingvokreanto.

Sed kvankam la denaskuloj ne bezonas korekti iujn difektojn de Esperanto, ili jes produktas formojn kaj strukturojn, kiuj estas novaj por plenkreskaj parolantoj, inkluzive de tiuj kiuj transdonis la lingvon al la koncernaj denaskuloj. Corsetti, Pinto kaj Tolomeo (2004) kolektis multajn belajn ekzemplojn de tiaj formoj, difinitajn de la geaŭtoroj kiel ekzemploj de superreguligo, ekzemple *elektrujo* ‘baterio’ aŭ *malĝustigi* ‘rompi’. Ĉar la tradicio de la Esperanta lingvokomunumo estas aprobi, eĉ kuraĝigi, kreeman uzon de la vortforma aparato de la lingvo, tiaj novformajoj tamen ne difineblas kiel malĝustaj kaj kontraŭgramatikaj, nur kiel nekutimaj (Corsetti k.a. 2004: 267). Ili montras, ke ankaŭ en Esperanto la lingvoscio de la denaskaj parolantoj konsistas el reguloj kaj analogioj, ne el simplaj imitaĵoj. Corsetti kaj lia kunaŭtoroj (2004: 262–263) supozas ankaŭ, ke la superreguligemon de la Esperantaj denaskuloj povas pliigi ilia dulingveco (aŭ kelkfoje trilingveco), ĉar dulingvismo favoras intelektan flekseblecon. Tion rekte pruvi povas tamen esti malfacile.

Sed kiel la denaskaj lingvoakirantoj de aliaj lingvoj, ankaŭ tiuj de Esperanto faras kelkfoje tiel nomatajn malĝustajn analogiojn. Ekzemple, knabino, parolanta Esperanton denaske, en la aĝo de 3 jaroj kaj 8 monatoj uzis ripete la esprimon *te mete* en la senco ‘tre multe’; verŝajne ĝin klarigis reanalizo de la ofta vorto *iomete* kiel *io(m) mete*. Ŝi ankaŭ nomis necesejon *encesejo*, verŝajne ĉar la strukturo de *necesejo* ne estas facile travidebla kaj *en-* kiel rekonebla morfemo iel asociiĝis kun la koncerna ĉambreto (kiun oni *eniras* aŭ kie oni estas *ene?*; ambaŭ ekzemploj estas el miaj propraj notoj). Tiaj novformoj ne havas ŝancon esti akceptitaj de la lingvokomunumo – ili povas eĉ havi malpli grandan ŝancon akceptiĝi ol en etnolingvoj, ĉar la norma Esperanto eksplicite kodigita havas fortan pozicion en la parolkomunumo kaj la “logikeco” kaj travidebleco de la vortformado estas strikte gardata.

Resume, la ekzisto de la denaskaj parolantoj pruvas, ke la strukturo de Esperanto ne signife diferencas de tiu de la naturaj lingvoj: Esperanto estas akirebla kiel unua lingvo, kaj la fenomenoj observataj en la lingvoakira procezo ne estas kvalite malsamaj ol en la naturaj lingvoj.

## 2. Denaskuloj detronigitaj

Multaj lingvistoj atentigis, ke malgraŭ la ekzisto de la denaskaj parolantoj de Esperanto, ili neniam formis parolkomunumon similan al tiuj de la naturaj etnolingvoj. Jam la klasika enkonduko en historian lingvistikon verkita de Raimo Anttila, pritraktante kreoliĝon, konkludis: “En iuj familioj Esperanto estas transdonata al la infanoj kiel unua lingvo, sed

neniaj parolkomunumoj ekestis” (Anttila 1972: 176, mia traduko). Renato Corsetti (1996b) vidis kaj “komunajn kaj malkomunajn trajtojn” en la ekesto de la kreolaj lingvoj kaj la denaskiĝo de Esperanto. En la kreola lingvistiko oni delonge emfazas, ke la ekesto de la parolkomunumo, eĉ se parte ne-denaska, estas egale grava kaj influa kiel la procezo de denaskiĝo mem (ekz. Sankoff & Laberge 1980).

Konata estas ankaŭ la komparo de Versteegh (1993) inter Esperanto kaj la revivigita hebrea lingvo (kp. Fellman 1973), sed la hebrean kompreneble subtenis la komunikaj bezonoj en Palestino kaj poste ankaŭ ŝtataj strukturoj. Por la interrilato de la denaskaj parolanto de Esperanto kaj la tuta Esperanta parolkomunumo mankas bona analogo en tiu direkto.

Lastatempe aperis studoj, en kiuj la rolo de la Esperantaj denaskuloj estas konsiderata nur marĝena. Fiedler (2012) rimarkigas, ke la denaskaj parolantoj de Esperanto estas malmultaj, havas pli ol unu denaskan lingvon, kaj ne havas normdonan rolon en la parolkomunumo. Ŝiaj observoj en si mem estas validaj: oni ne uzas denaskajn parolantojn ekzemple por kontroli la ĝustecon de tekstoj publikigitaj. Efektive, la malgranda rolo de la denaskaj parolantoj estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de la facileco de Esperanto kiel dua lingvo (Fettes 1996: 56–57, referencante al Nikola Rašić).

Fiedler (2012: 74–75) prezentas tamen ankaŭ motivojn por kritiki la aperon de la denaskaj parolantoj: ilia ekzisto kontraŭdiras la ideon de Esperanto kiel neŭtrala demokratia komunikilo, kiun neniu posedas. Laŭ mi ŝi tamen konfuzas argumentojn priskribajn kaj lingvopolitikajn: por lingvistike priskribi kaj kompreni la fenomenon de denaskuloj oni ne bezonas havi opinion pri la ideologia dezirindeco de tiu fenomeno. Krome, priskribante la ideologion de la Esperanto-movado, Fiedler (2012: 75) atribuas la devizon “ĉies dua lingvo” al Zamenhof, sen fontindiko, kvazaŭ tio estus fakto ĝenerale konata. Laŭ mi ŝi kulpas je anakronismo: Zamenhof (1991 [1900]: 340) ne trovis la naciajn lingvojn aparte defendindaj, se iu internacia lingvo ilin vere povus anstataŭi (kp. ankaŭ Pietiläinen 2010). En sia konata letero al Abraham Kofman, de la 1901a jaro, Zamenhof skribas, ke Esperanton grave fortikigus ekesto de “ia grupo da homoj, kiuj akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, *heredan*” (Zamenhof 2006: 97, emfazo en la originalo). En la movado neniam regis unueca opinio pri la valoro de denaskaj parolantoj.

Ken Miner (2010), profesia lingvisto bonege scianta Esperanton, titolis sian artikolon pri la denaskaj parolantoj de Esperanto provoke:

“la neebleco de priesperanta lingvoscienco”. Laŭ li, la ĝusta Esperanto traduko de la angla *native speaker* estus ne *denaska parolanto* sed *indiĝena parolanto*. Esperanto malhavas indiĝenajn parolantojn, kiuj uzus ĝin kiel sian solan fortan lingvon en komunumo de aliaj similaj parolantoj, kaj tial ĝi eĉ marĝene ne kreoliĝis. Ĉar la tasko de la lingvoscienco estas malkovri la regulojn implicite sciatajn de la indiĝenaj parolantoj, Esperanton ne eblas esplori per lingvosciencaj metodoj: kiam oni demandas la parolantojn de Esperanto, denaskajn aŭ ne, pri frazoj kiuj troviĝas ekster la evidente ĝustaj, la respondoj varias kaj la respondantoj komencas aktive atribui al la frazoj eventualajn signifojn – kio estas kontraŭ la ĉomskia principo pri la aŭtonomeco de la sintakso. Ĉi tia svageco de la reagoj malebligas pri-Esperantan lingvistikon, laŭ Miner.

Iu alia lingvisto povus diri, ke la reagoj de la denaskaj (aŭ laŭ Miner, indiĝenaj) parolantoj ankaŭ de etnolingvoj al ekzemploj elpensitaj de la lingvisto ne ĉiam estas tiel ideale malsvagaj, kiel Miner ŝatus vidi. Multaj lingvistoj opinias, ke la reguloj de la lingvo estas fideinde malkovreblaj nur en grandegaj tekstaroj. Krome, kelkfoje oni ja uzis Esperanton en teoriaj lingvistikaj studoj kiel lingvon difinitan de la kompetento de la flua (ne-denaska) parolanto (ekzemple en Dasgupta k.a. 2000), kaj ia principa svageco ne ŝajnas malhelpi al tio.

La ĉefa problemo en la tezo de Miner estas tamen lia malvasta difino de la lingvoscienco. Li efektive ekskluzivas el ties kampo multajn lingvojn, kiuj reale estas esplortaj de kompetentaj lingvistoj, kaj kiuj donas valorajn datenojn pri la homa lingvo ĝenerale. La piĝinoj estas evidenta ekzemplo, sed ne la plej grava. Multaj malgrandaj lingvoj en la mondo ne plu havas unulingvajn parolantojn plenkreskajn, sed estas konstante influataj de aliaj, pli grandaj lingvoj. Pluraj kreolaj lingvoj dum sia tuta ekzistado estis sub tia influo de sia prestiĝa leksikondona lingvo (ofte la hispana, franca aŭ angla), sed la lingvistoj tamen studis ilin. Kaj eĉ se iu minoritata lingvo fine fariĝis la dua lingvo de ĉiuj siaj parolantoj, ĝi ne ĉesis esti signifoplena studobjekto. Ekzemple la romaa lingvo parolata en Finnlando praktike ne plu havas denaskajn parolantojn, sed iel-tiel ĝi tamen konserviĝis kiel grava simbola posedaĵo de la romaa malplimulto kaj estas relative flue parolata de parto de la romaoj (Granqvist 2012).

### 3. La socia natureco

Kiel ankaŭ Corsetti (1996b) emfazas, la fenomeno de denaskaj parolantoj de Esperanto devas esti konsiderata en sia socia kunteksto, ekster la malvastaj limoj de la ĉomskia lingvistiko, kiu volas loki ĉion lingvistike

signifan en la hereditan lingvokapablon de la homo. La Esperanta lingvo-komunumo plurrilate similas al tiuj de la etnolingvoj, kvankam la denaskuloj ne havas gvidan rolon en ĝi. Pionira artikolo tiurilate estas tiu de Richard E. Wood (1979), kiu difinis la lingvokomunumon de Esperanto kiel “libervolan, ne-etnan kaj ne-teritorian”. Mark Fettes (1996), baze de la sociologiaj studoj de Nikola Rašić, skribis pri Esperantujo kiel “kvazaŭ-etna lingva malplimulto”, kvankam kun demandosigno. La fama lingvotipologo Bernard Comrie (1996: 53) eĉ konkludis, ke en sia internacia uzo la angla jam sendependiĝis de sia lingvokomunumo, dum Esperanto kreis por si tian (kp. tamen Lindstedt 2010b).

Efektive, unu el la tipaj ecoj de natura lingvo, nome konstanta spontanea ŝanĝiĝo, efektivigis en la Esperanto-komunumo, sendepende de la denaskaj parolantoj. Wood (1979: 444–445) mencias kiel ekzemplojn la verbojn *krokodili* kaj *ŝati*. La signifon kaj uzon de *krokodili* oni povas kompreni nur en la kunteksto de la sociaj normoj de la lingvokomunumo, kie estas virto utiligi ĉiujn eblojn ekzerci sin en Esperanto. La verbo *ŝati* origine signifis ‘alte taksí’, kaj plu devus tion signifi laŭ la Fundamento, sed ĝi ŝoviĝis al la signifokampo de *ami* kaj *plaĉi* tiel, ke frazoj de la tipo *mi ŝatas glaciaĵon* aŭ *mi ŝatas bicikli* fariĝis eblaj – kio siavice necesigis la kreon de la nova verbo *apreci* / *aprezi* por la malnova signifo de *ŝati*. Plia ekzemplo povus esti la signifoŝoviĝo de *klopodi*, kiu disde la origina signifo de ‘maltrankvile kaj ekscitiĝe zorgi’ ŝoviĝis al la direkto de *provi*, tiel ke frazoj kiel *mi klopodis veki ŝin* sonas nun nature. La verbo *krokodili* havas jam neklaran etimologion, kiu tute ne estas konata por la nuntempa parolanto. La verboj *ŝati* kaj *klopodi* liberiĝis de la katenoj de siaj originaj etimoj (ĉe *ŝati* temas pri la germana *schätzen* kaj la jida *shatsn*; ĉe *klopodi* pri la rusa *hlopotat* kaj pola *kłopotac się*, kiuj ne aperas kun komplemento).

“Naturan Esperanton” oni povas do serĉi ne nur en la lingvaĵo de la denaskaj parolantoj, sed ankaŭ en la spontaneaj ŝanĝiĝoj de la lingvo, okazintaj en la Esperanta lingvo-komunumo kiel tuto. Ankaŭ la nedenskaj parolantoj, ekde Zamenhof mem, neniam posedis kompletan eksplicitan gramatikon, kiu donus al ili la tutan regularon de la lingvo. Ilian lingvo-uzon subkonscie influis la modeloj de aliaj lingvoj kaj, oni devas supozi, ilia ĝenerala biologia lingvokapablo.

En siaj studoj Kimura (2010, 2012) atentigis pri pluraj interesaj similaĵoj inter Esperanto kaj certaj minoritataj lingvoj, precipe tiaj eŭropaj, kies pluvivo postulas konscian socian subtenon (la ekzemplo de Kimura estas la soraba) aŭ kiuj eĉ estis revivigitaj post la kompla formorto de

la denaska parolantaro (lia ekzemplo estas la kornvala). Lerni kaj paroli ilin postulas libervolan decidon de la individuo, kiel ĉe Esperanto, kaj tiun decidon apogas idea engaĝo, ne malsimila al la “interna ideo” de Esperanto. Disputoj pri lingvaj detaloj okazas en tiuj lingvaj movadoj kiel en Esperantujo. Se plenkreskuloj, lernintaj lingvon revivigitan, decidas transdoni ĝin al siaj infanoj, ilia situacio similas al tiu de la gepatroj de Esperantaj denaskuloj. Eĉ etneco estas nur ŝajna diferenco: la loĝantoj de Kornvalo en Britujo ne plu estas difineblaj kiel aparta etno, kaj la sorablingvajn infanvartejojn (lingvonestojn) vizitadas ankaŭ infanoj, kies gepatroj estas etne germanaj.

Kiel ankaŭ Kimura atentigas, la paraleleco inter Esperanto kaj minoritataj lingvoj ne estas facile rekonata en unu aŭ alia grupo de lingvaj aktivuloj. La revivigantoj de malgrandaj lingvoj volas eviti la impreson, ke ili kreis ion egale “artefaritan” kiel Esperanto. Kaj la universalisma celo de la Esperanto-movado ŝajnas esti rekte kontraŭa al la rolo de lingva malplimulto. Tamen, la ekesto mem de Esperanto kiel rezulto de certa historia multlingva situacio en Orienta Eŭropo (Lindstedt 2009) kaj ĝia uzo en familioj (Lindstedt 2010a) povas esti plene komprenata nur se similecoj, eĉ surprizaj, kun aliaj lingvaj fenomenoj estas konsiderataj.

La malsimpla rolo de la denaskuloj do ne faras Esperanton unika lingvo. La biologia ekzistomaniero de la homa lingvo ne estas komprenbla ekster ĝia socia ekzistomaniero (kp. Keller 2003). En la ekesto de la kreolaj lingvoj aŭ en la revivigo de la hebrea aŭ la kornvala grave rolis ne nur la unuaj denaskuloj, sed ankaŭ la procezoj okazintaj en la tuta parolkomunumo, inkluzive de la ne-denaskaj parolantoj. Aliflanke, multaj minoritataj lingvoj ne plu posedas denaskajn parolantojn neinfluatajn de aliaj lingvoj, kaj tial ili povas iom post iom fine fariĝi *engrupaj duaj lingvoj*, kiuj transvivas nur danke al konscia lingvolernado kaj lingvoplanado. La malfacila demando, kio en la strukturo kaj ŝanĝiĝo de Esperanto estas natura, havas do pli vastan lingvosciencan kuntekston.

## Bibliografio

Anttila, R. (1972). *An Introduction to Historical and Comparative Linguistics*. New York: Macmillan.

Bergen, B. K. (2001). “Nativization processes in L1 Esperanto”. *Journal of Child Language* 28. pp. 575-595.

Comrie, B. (1996). “Natural and artificial international languages: A typological assessment”. *Journal of Universal Language* 3. pp. 35-55.



Corsetti, R. (1993). “Macchina daddy lampo: alcune osservazioni su un caso di trilinguismo dalla nascita in italiano, inglese ed esperanto”. *L’esperanto*. Numero speciale. 6/1993.

Corsetti, R. (1996a). “A mother tongue spoken mainly by fathers”. *Language Problems and Language Planning* 20. pp. 263-273.

Corsetti, R. (1996b). “Esperanto kaj kreolaj lingvoj: komunaj kaj malkomunaj trajtoj en la kreoliĝo”. En Košecký, S. (red.). *Multkulturaj familioj de nuntempa Eŭropo*. Bratislavo: Esprima. pp. 11-36.

Corsetti, R. & Pinto, M. A. & Tolomeo, M. (2004). “Regularizing the regular: The phenomenon of overregularization in Esperanto-speaking children”. *Language Problems and Language Planning* 28. pp.261-282.

Dasgupta, P. & Ford, A. & Singh, R. (2000). *After Etymology: Towards a Substantivist Linguistics*. Muenchen: Lincom Europa.

Fellman, J. (1973). *The Revival of a Classical Tongue: Eliezer Ben Yehuda and the Modern Hebrew Language*. The Hague & Paris: Mouton.

Fettes, M. (1996). “The Esperanto community: A quasi-ethnic linguistic minority?” *Language Problems and Language Planning*. 20. pp. 53-59.

Fiedler, S. (2012). “The Esperanto *denaskulo*: The status of the native speaker of Esperanto within and beyond the planned language community”. *Language Problems and Language Planning* 36. pp. 69–84.

Granqvist, K. (2012). “Romanikielen historiaa Suomessa”. En: Pulma, P. (red.). *Suomen romanien historia*. Helsinki: Suomalaisen Kirjallisuuden Seura. pp. 272-289.

Keller, R. (2003). *Sprachwandel. Von der unsichtbaren Hand in der Sprache*. Tübingen – Basel: A. Francke.

Kimura, G. C. (2010). “La kornvala kaj Esperanto: entreprenoj similaj?” En: Blanke, D & Lins, U. (red.). *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. pp. 171-177.

Kimura, G. C. (2012). “Esperanto and minority languages: A sociolinguistic comparison”. *Language Problems and Language Planning* 36. pp. 167-181.

Lindstedt, J. (2006). “Native Esperanto as a test case for natural language”. *SKY Journal of Linguistics* 19. pp. 47–55.

Lindstedt, J. (2009). “Esperanto – an East European contact language?” En: Voß, C. & Nagórko, A. (red.). *Die Europäizität der Slawia oder die Slawizität*

*Europas: Ein Beitrag der kultur- und sprachrelativistischen Linguistik.* München – Berlin: Otto Sagner. pp. 125-134.

Lindstedt, J. (2010a). “Esperanto as a family language”. En: Dervin, F. (red.). *Lingua francas: La véhicularité linguistique pour vivre, travailler et étudier.* Paris: L’Harmattan. pp. 69–80.

Lindstedt, J. (2010b). “Lingvo – rimedo aŭ resurso?” En: Blanke, D. & Lins, U. (red.). *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. pp. 51–62.

Miner, K. (2010). “La neebleco de priesperanta lingvoscienco”. En: Blanke, D. & Lins, U. (red.). *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. pp. 259–270.

Pietiläinen, J. (2010). “Plurlingvismo kaj Esperanto: Ideologia ŝanĝiĝo en la Esperanto-movado”. En: Blanke, D. & Lins, U. (red.). *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. pp. 781–792.

Sankoff, G. & Laberge, S. (1980). “On the acquisition of native speakers by a language”. In: Sankoff, G. *The Social Life of Language.* Philadelphia: University of Pennsylvania Press. pp. 195–209.

Versteegh, K. (1993). “Esperanto as a first language: Language acquisition with a restricted input.” *Linguistics* 31. pp. 539–555.

Wood, R. E. (1979). “A voluntary, non-ethnic, non-territorial speech community”. In: Mackey, W. E. & Ornstein, J. (red.), *Sociolinguistic Studies in Language Contact: Method and Cases.* The Hague, Paris & New York: Mouton. pp. 433–450.

Zamenhof, L. L. (1991) [1900]. “Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia”. En: Auld, W. (red.), *Nova Esperanta Krestomatia.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. pp. 336–365.

Zamenhof, L. L. (2006.) *Mi estas homo.* Kaliningrado: Sezonoj.